

5 Centimes

L A

5 Centimoj

ALGÉRIA STELO

L'ÉTOILE ALGÉRIENNE

Petit Organe de Propagande Espérantiste de l'Afrique du Nord

BI-MENSUEL

★★★

DUONMONATA

Prix de l'Abonnement annuel		Kosto de la Jara Abono	
Algérie, Tunisie.....	2 fr. »	Alĝerujo, Tunisujo.....	2 fr. »
France	2 fr. 50	Francujo.....	2 fr. 50
Etranger.....	3 fr. »	Eksterfrancaj landoj.....	3 fr. »

Les Annonces sont reçues à
l'Administration du Journal, 57,
rue d'Isly, ALGER.

Prix sur demande

DIRECTEUR-FONDATEUR
Barthélemy BALS
ADMINISTRATEUR
Louis LANDES

La Anoncoj estas ricevataj al
la Administracio de la Ĵurnalo,
57, rue d'Isly, ALGER.

Prezoj laŭ peto

KVITAJ (Anekdoto)

Por kunhelpi al la sukceso de tiu ĉi revueto kaj, tiel, daŭrigi propagandi por la lingvo Esperanto, mi sendis al multaj ĉiulandaj gekorespondantoj, ekzemplerojn da ĝi, kiujn mi ricevis de l' redakcio.

Kelkaj el tiuj korespondantoj bonvolis aboni, aliaj petas senkulpon ĉar tion ili ne povas fari pro tiu aŭ alia tialo, ĉiuj afable min dankis. Multaj el ili resendinte interŝanĝe, esperantajn revuojn el sia lando (pro kio miavice tre dankas ilin.) Tio al mi memorigis la ŝercan fakton jenan :

Dum mia juneco (feliĉa tempo jam iom malproksime) mi aliĝis al muzika societo, kredoble kiel vi ĉiuj, ĉu ne vere karaĵ legantoj? Pli malpli, iam ĉiuj ni blovis en ian muzikinstrumenton.

Tiu muzikaro havis kutimon, antaŭtage nomfeston de ĉiu el siaj anoj, alfari serenadon antaŭ la domo de l' festato.

Tiu ĉi, ĉiam zorge antaŭsciigita, ĝoje ekaperis ĉe l' fenestro, post malsuprenirinte li petis, ke ni eniru en lian loĝejon kie, kantante, deklamante, muzikante, kriante, kaj precipe ridegante, oni trinkis kaj retrinkis ĉiuspecajn trinkaĵojn meze de tiu bruo pligrandigita per eksplodbruoj de l' korkoj de ĉampano.

Ian tagon, alvenis la festo de nia nova cimbalo, maljuna fraŭlo, eksregna oficisto, bonvivulo ĉiam gaja kaj kontenta. La muzikaro senbrue antaŭeniras ĝis lia domo kaj, — unu, du, tri, kvar — subite eksonegas en la nokto muzikaj kaj kuprasoj eĥoj.

Nia amiko nur vestita de noktaj ĉemizo kaj kapvesto tuje malfermas sian fenestron, kie li aperas kun surpriza mieno ; kaj tuj kiam la ario estis finita, li ekprenis siajn cimbalojn, kaj ilin batante per rapidegaj batoj unu kontraŭ la alian, dzim, dzim-dzim-dzim-dzim..., dzim, dzim, dzim-dzim-dzim..., dzim, dzim.... fine haltante kaj kliniĝante al ni, li ekkrias fortavoĉe : « Nune, ni estas kvitaj » kaj li reeniris refermante vitrojn eĉ fenestrajn kovrilojn.

La bruega ridesplodo kiu daŭris de l' tempo kiam komencis tiu ridinda sceno tuj ekpligrandigegis ĉe l' fenestroj de l' ĉirkaŭaĵo, kie troviĝis amaso da loĝantoj, sed iom post iom ĝi haltis malsupre, kie la muzikantoj bone atendis ian neevitoblan ŝercan, sed ne tiel tutan mistifikadon.

Sola, nia tamburisto, eksregimentamburisto, drinkemulo enradikita kaj portisto kiam li povis, ne malesperis, certigante ke li alportis ĵus hodiaŭ du korbojn da ĉampano al nia kolego. Tial la situacio daŭradante, li ekdonas perfortan ŝultrobaton al la pordo, kiu malfermiĝis sen ia malcedo ; kaj tiam okazis vera enpenetrado en la domon de l' cimbalo.

Sed, kia ĝojiga surprizo kiam suprenirinte ni ekvidis grandan manĝotablon ŝarĝitan de lumingo, de floroj, de multegaj frandaĵoj kaj trinkaĵoj, kaj sur la sojlo nian amikon, korekte frakvestita kiu, tute ridetante, amikege ricevis nin en sian hejmon.

Do, la vesperkunveno, aŭ pli ĝuste la noktkunveno, bonege finiĝis, sed longatempe oni ridadis, oftege ripetante ; « Nune, ni estas kvitaj. » Vi vidas, ke nuntempe, oni ĝin ne ankoraŭ forgesis.

A. BAISSAC.



HEJMA BIBLIOTEKO

Ivan H. Krestanoff

— P. Dep. P. Igaro —



Poŝta Kesto

Kelkaj el niaj legantoj demandas nin, kial ni ne malfermas en nia ĵurnalo « Poŝtan Keston ». Per tio ni povus respondi la demandojn, kiujn il faras al ni.

Tute pravaj ili estas, ĉar ni ne povas ĉiam respondi individue al la demandoj senditaj de ili. Pro tio, ni malfermas de tiu ĉi numero, nian « Poŝtan Keston », en kiu la respondoj estos enpresitaj senpage.

Oni devas sendi la demandojn al S-ro BARTHÉLEMY BALS, direktoro de « Alĝeria Stelo », 57, rue d'Isly, Alĝer'o.

Al S-ro C. MULKAY, Bruxelles. — Nous avons bien reçu votre intéressant article, mais nous regrettons de ne pouvoir l'insérer actuellement. Comme il traite les particules d'une langue nationale, nous réservons pour plus tard sa publication.

Al Kelkaj Komercistoj. — Jes, ni sendos, laŭ peto, prezojn por publiko de anoncoj en nian ĵurnalon.

Al Fraŭlino ROSE S. — La kursoj farataj en la filina lernejo estas senpagaj; do, ni tutekore esperas vidi vin en tiuj kursoj, kiel vi diris al ni.

Al nia Amiko V. M., Alĝer'o. — Jes, ni vendas esperantajn signojn (verda stelo Gasse). Prezo: 1 franko; per poŝto: 1 fr. 15.

Al S-ro W. B., Anglujo. — Laŭ via deziro, ni povas sendi al vi lernolibrojn esperantajn-francajn.

Al S-ro O. L., Mustapha. — Sendu al ni, kiel eble plej baldaŭ, ni petas vin, vian abonpagon kaj la pagon de viaj anoncoj en nia ĵurnalo.

Al S-ro TH. CART kaj L. DE BEAUFONT, Parizo. — Ni tre multe dankas vin por viaj aĝablaj sendoj.

Ni sciigas ankaŭ ĉiujn francajn kaj fremdajn komercistojn, ke ni povas havigi ĉiujn agentojn por la vendo de iliaj komercaĵoj. Sin turni al S-ro LUDOVIKO LANDES, administranto de la ĵurnalo.

Ni povas ankaŭ publikigi ĉiujn sciigojn por poŝkartaj interŝanĝoj aŭ aliaj aferoj, po dek-kvin centimoj ĉiu tri-dek literaj linio.

B. B.



ÉCHOS



EĤOJ



UNE HEURE D'ESPERANTO.

Conférence dialoguée de M. Cart.

Cette conférence devrait être faite dans toutes les villes où se trouvent des personnes approuvant l'Esperanto. Ce serait un bon instrument de propagande et nous ne saurions trop la recommander à nos lecteurs à deux points de vue: le premier c'est que l'Esperanto aurait beaucoup à y gagner; le deuxième, c'est une bonne œuvre, puisque cet opuscule est vendu au profit des aveugles au prix minime de 50 centimes.

La « Alĝeria Stelo » recevra avec plaisir les commandes qui lui seront faites et les transmettra à l'éditeur.

* * *

LA LANGUE INTERNATIONALE PEUT-ELLE ÊTRE LE LATIN ?

Nous avons reçu un exemplaire de la très intéressante brochure de M. de Beaufront: « La langue internationale peut-elle être le latin ? » Dans cette plaquette, M. de Beaufront explique que le latin ne peut pas être choisi comme langue internationale. D'ailleurs ces explications ont été publiées dans « l'Espérantiste ». Tous les partisans de l'Esperanto voudront posséder cette brochure qui intéresse au plus haut point la langue internationale et ses approbateurs. — Prix: fr. 0,60.

ALĜERO.

Inter la multaj personoj, kiuj alvenis aŭdi la antaŭparolado al la malfermo de la nova esperanta kurso farata de S-ro Ludoviko Landes, troviĝis adeko da suboficiroj, brigadiroj kaj soldatoj el la 4-a kompanio de laboristoj, alvenigitaj al la lingvo Esperanto per parolado de Kapitano Capé farita en la soldatejo laŭ demando de kolonelo Mayer.

* * *

KONSTANTINO.

Nia sindona propagandisto, S-ro Baisac, malfermis trian esperantan kurson. Alvenas al tiu kurso kelkaj ŝtatoficistoj kaj multaj sinjorinoj kaj fraŭlinoj. Niaj gratuloj al la unuaj Konstantinaj esperantistinoj.

* * *

Esperanta Ligilo, Ĉiudumonata

Revuo. — Th. CART, ĉefredaktoro
12, rue Soufflot, Paris

Abonkosto: jare 3 fr. — Dua jaro (1905)
N° 3. — *Enhavo*: 1. Avizo kaj notoj (Th. Cart). — 2. Norda printempo, daŭrigo (H. Karlsten). — 3. Revajo (Grabovski). — 4. Kongreso en Boulogne. — 5. Kroniko (Thilander). — 6. Problemoj. — 7. Miksaĵo. — Felietono: Janko Muzikanto, daŭrigo, Srul el Lubartov.

ESPERO.



TIMGAD



— SEKVO —


La kolonetoj apogitaj sur la flankaj muroj staras ankoraŭ tutaj. La varmo de la fornoj estis disdonata en la subaĵo kaj forkuris en la vaporbanejon per malfermaĵoj en la arkaja plafono.

Estis en Timgad, krom la publikaj konstruaĵoj, varmbanejoj (thermi); ilia aro denove atentigas pri la lerta utiligo de la akvoj dum la romana epoko. De ĝi, oni devas konkludi, ke la lando estis tiam arbara; tia hipotezo estas certigita, laŭ la rimarko de S-ro Gaston Boissier, ne nur de la esto, en grandegaj ebenaĵoj, de izolataj arboj, lastaj restaĵoj de la malaperinta arbaro, sed ankoraŭ la raportoj de la arabaj historistoj pri la vidaĵo de la lando, en la monteto, kiam alvenis SIDI-OKBA, apud la oazo, kiu ricevis lian nomon.

Pro ilia neantaŭzorgo la venkistoj ne konservis la malnovajn akvokondukilojn kaj forigis la bariloj kontraŭ la perdiĝo (malapero) de la pluvakvoj

en la uedoj, tiamaniere ke, hodiaŭ, la montoj estas senkreskaĵaj kaj, ĉe multaj lokoj, ne taŭgaj por la replanto de arboj.

Paralele je la ekstremaĵo de Forum, kaj sur pli alta etaĝo, oni renkontas la teatron. Laŭ romana kutimo, la konstruaĵo kuŝas sur montetflanko; tiamaniere oni ricevis, kiel eble spareme, amfi-




SANKTEJO DE LA TIMGADA GENIO

teatron perfekte firman. Nur la lastaj vicoj de la ŝtupoj ankoraŭ restas antaŭe la or estro kaj la sceno. Transe, senstilaj kolonoj estas kvazaŭ limo de l' loko rezervita por la artistoj. Transe, troviĝas ankoraŭ piedestalo de duobla vico de kolonoj;

tiuj kolonoj, kies kapituloj estis fine skulptitaj, verŝajne subportis galerion formantan peristilon kaj promenejon.

En Guelma, oni povas vidi, en roma teatro tute nezorgata, la aranĝon de la supera parto de la monumento, detruitan en Timgad.

Centre, rigardante la sceno, grandan « logion » kun duobla flanka enirejo, kaj ĉiuflanke, iom malsupre, la enirejon de la superaj ŝtupegoj,



BAZARO

(Daŭrigota).

Traduko de Esperantisto.



Auguste BAISSAC
1, Rue d'Aumale, 1
CONSTANTINE (Algérie)



Memoraĵoj de mia Vojaĝo en Setifo



Ekveturinta de Alĝero kun la vagonaro la 12-an de januaro, je la 6-a horo matene, mi ne povis, pro la troa matenfrueco, admiri la alĝeran ĉirkaŭaĵon; nuren Menerville mi povis ĝui la vidaĵon de belegaj panoramoj, kiu malvolviĝas antaŭ mi: kiajn belegajn kamparojn! kian plezuron por la okuloj! — En Buirā, kien ni alvenis je la 10-an horo, mi rapidege tagmanĝis, ĉar tre mallonga estas la halto. Tiam, la vagonaro eniras belegajn gorĝojn, kiujn, tro rapide, laŭ mia deziro, ni traveturas, ĉar ili estas vere belaj, kaj mi dezirus pli bone vidi ilin; fine, je la 4-an horo vespere, la vagonaro alvenas al Setifo, celo de mia vojaĝo.

Setifo kuŝas sur alta plataĵo je 1.200 metroj ĉirkaŭe, super la marnivelo, ĝi estas malproksima de Alĝero 308 kilometrojn kaj de Konstantino 156; dum tiu sezono, la neĝo kovras la teron kaj la temperaturo estas tre malalta kaj malvarma. La stacidomo troviĝas dek minutojn malproksime de la pordo de la urbo, sed multaj konstruaĵoj altiĝas ĉiutage sur la ĉirkaŭantaj teroj, kaj, antaŭ ne longa tempo, tiu ĉi parto de Setifo estos tre grava antaŭurbo.

Defendmuroj, laŭ la arabmaniero, ĉirkaŭas la urbon, en kiun oni eniras per kvar pordoj: la pordo de Konstantino, la pordo de Alĝero, alia pordo malfermiĝas sur la vojo al Ampère kaj Batna, la kvara pordo kuŝas ĉe la alta parto de la urbo kaj havigas aliron al la milita kvartalo. Tiu ĉi kvartalo, kiu enhavas la soldatejojn, la militan hospitalon, la oficejojn de la militestro, k. t. p., estas tute apartigita de l' urbo kaj ĉirkaŭita per defendmuroj; porda malfermiĝas sur la vojo al Buĝi.

La strato de Konstantino estas tre belega aleo kun grandegaj arboj, ĝi estas larĝa 12 metrojn, kaj estas la ĉefstrato de Setifo. Proksime la pordo de Alĝero, dekstre, kuŝas la urbestra domo, ĉe kiu ankaŭ estas la sidejo de la « Setifa populara legado Societo » (Société populaire de lecture de Sétif); kontraŭ la urbestra domo, maldekstre la strato de Konstantino, kuŝas araba moskeo, kiu estas tre stranga kaj beleta; proksime, oni trovas la teatron kaj la juĝejon, fine grandegan longan placon kiu havas, en la mezo, la katalikan preĝejon kaj belan kovritan publikan vendejon; sur la flankoj de l' placo, estas la nereligiaj lernejoj, la kolegio kaj la subprefektejo.

La urbo estas tute lumigata per elektra lumo, kaj, resume, Setifo faras tre agrablan impreson.

Ekster la pordo de Alĝero, kaj nur kelke da paŝoj malproksime, oni trovas la publikan ĝardenon ĉe kiu oni vidas multajn ŝtonajn pecojn, kiu elvenas de antikvaj romanaj kaj arabaj ruinoj; oni vidas ankaŭ statuon (buston) de l' Duko de Orléans sur kolono kun surskribo, kiu memorigas ke soldatoj de diversaj rigimentoj de la Setifa garnizono faris la jenan ĝardenon.

Setifo ne estas granda urbo, sed ĝia komerco estas sufiĉe grava, kaj la loĝantaro sufiĉe multa kaj tre afabla. — Dum dudek tagoj, kiujn mi loĝis en Setifo, mi bone sukcesis enradiki la verdan standardon de l' Esperanto, kaj fondi Setifan sektion de la Grupo de Alĝero kaj de l' Nordafriko, kies Sinjoro advokato Ludoviko Martin estas prezidanto, kaj, dank' al la fervora agemo, kiun li alportas por nia kaŭzo, certe Esperanto baldaŭ triumfos en Setifo kiel ĝi triumfis en la tuta mondo.

Sinjoro Martin jam komencis publikajn kursojn, kiujn li faras ĉiusemajne, la lundon kaj la vendredon, en la ĉambro de la Knaba lernejo.

GRAFO ALBERT GALLOIS,

Membro de la Grupo de Alĝero kaj de la Nordafriko.

RECHERCHES dans tous les pays de généalogies, documents historiques et biographiques, titres nobiliaires, armoiries, ordres de chevalerie, distinctions, etc. **Informations, C. MULKAY**, 16, rue des Minimes, Bruxelles (Belgique). Reçoit sans frais communs, annonces, abonnements à *La Algérie Stelo*.

L'INSIGNE **espérantiste**
Etoile Verte
d'Emile GASSE INTERNATIONAL
est en vente dans nos bureaux, 57, rue d'Isly, Alger, au prix de 1 franc; par poste recommandé, 1 fr. 15.

Tous les Espérantistes doivent avoir **l'Etoile Verte**.

Le Gérant: MICHEL LLEDO.

Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly.

Lettres accentuées de la Maison TURLOT, CHAIX et C^o, 128, rue de Rennes, Paris

